

Amuzaj poemoj el Verdkata testamento de Schwartz




Martin Strid 2017




**Rajmondo
ŠVARCO**

naskiĝis
1894 en
Metz,
mortis
1973 en
Parizo



RAYMOND SCHWARTZ

**KIEL AKVO
DE L' RIVERO**



Edistudio

Verkoj de Schwartz

***Verdkata Testamento* 1926**
(poemaro)

***Prozo ridetanta* 1928**

***Anni kaj Montmartre*, 1930**
(romaneto)

***La Stranga Butiko* 1931**
(poemaro)

***La Ĝoja Podio*, 1949**

***Kiel Akvo de l' Rivero* 1963**
(romano)

***Ne kiel Meier!* 1964**

***... kun siaspeca spico!*, 1971**

***Vole ... Novele* 1971** (novelaro)

Verdkata Testamento

(1926)

72 poemojn. Inter ili:
43 baladigeblajn,
25 baladigitajn ĝis 2016

VERDKATA TESTAMENTO



DE

RAYMOND SCHWARTZ

Baladoj el Verdkata testamento (1)

- & Al molaj plorantoj!, 205 paŝoj.
- & Bonfara Influo de la Alkoholo, 344.
- & Ĉu peko?, 215.
- & Dek Aforismoj el kiuj ĉiu estas Sentenco ne sen Senco!, 209.
- & Epikuraca kanto, 245.
- & Esperanta gazetaro, 350.
- & Esperanta geedziĝo, 418.
- & Esperantisto, Ekesto kaj Malapero, 525.
- & Festeno, 841.
- & Juĝu prudente!, 344.
- & Kata logo, 402.
- & Konvena ĉapelo, 294.
- & La ĉevalo de la angla princo, 420.



Baladoj el Verdkata testamento (2)

A photograph of two cats sitting on a paved surface. The cat in the foreground is a vibrant green color, looking towards the camera. The cat in the background is a ginger or orange color, also looking towards the camera. The background is slightly blurred, showing more of the paved ground and some greenery.

& La filo de l' bataliono, 372.

& La nova jar', 488.

& Meditaĵoj pri la lasta tago de finiĝanta jaro, 200.

& Mia kunulino, 238.

& Ministro-filistro, 287.

& Napoj, 611.

& Pli da lumo!, 232.

& Preciza Raporto pri la Dekkvina Kongreso en Nürenberg
de nia Usona Amiko Sam Ideano, 868.

& Senhareco, 774.

& Sic transit gloria mundi!, 287.

& Tiu super ni!, 539.

& U. S. A., 210.

& Epikuraca kanto:

(#: <:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La (#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a a;))x7)+(&:

'1 /Sciu nun, samidea2n', ; Ke dependas via san' ; De regula bonhumo2r', ; De ĉiama senlabor'!

(x:: **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.**)

'2 Laŭ spertita homa kon' ; Plej utila estas mon', ; Tial do naskiĝu vi ; En riĉega famili'!

'3 La virinoj, jes, en ver', ; Taŭgas tre por am-afer', ; Prunteprenu sen cinik' ; La edzinon de amik'!

'4 Kaj por peli zorgojn for ; Taŭgas ĉiam la likvor', ; Tial trinku kun kuraĝ' ; Eĉ dum plej maljuna aĝ'!

'5 Al sanigo de l' stomak' ; Helpas ĉefe la tabak', ; Tial fumu dum la viv' ; Pli eĉ ol lokomotiv'!

'6 Kaj se malgraŭ la princip' ; Ne plu fumas via pip', ; Estas tial, ke sen dub' ; Malpuriĝis ĝia tub'!

'7 Vivu am' kaj bonhumor', ; Kaj tabako kaj likvor'! ; Post la vivo kun enu' ; Dormos ni en tomba tru'!



& Esperantisto, Ekesto kaj Malapero (1):



(#: <:23> (i;Mi /SooMiMi La Mi i;Mi
SooMiMi La Mi i; (#Rekantaje: So
dodo Ti La So MiMi La Mi i; So
SoSo SoFa MiRe Do So Mi))x21
)+(&:

'1 Ga/zetartikolo ; Aŭ varba parolo.
(x:; **Ek sur la tero kaj malapero ;
Dancu ni bele en la kosma ĉen'.**)

'2 Favora impresio, ; Ekintereso.

'3 Lernolibro, ; Sankta vibro,

'4 Propaganda miasmo: ;
Entuziasmo!

'5 Samideano, (Je via sano!)

'6 Kamarado, ; Varbado,

'7 Instruo, ; En butontruo

'8 Verda flago, ; Glora tago!

'9 Plua ŝtupo ; Nova grupo.

& Esperantisto, Ekesto kaj Malapero (2):



(x.; Ek sur la tero kaj malapero ;
Dancu ni bele en la kosma ĉen'.)

- '10 Nova sento, ; Facila vento
- '11 Kaj poemo ; Pri sama temo!
- '12 Post hezito ; Delegito.
- '13 Laŭ bezono ; Gazetabono,
- '14 Kotizoj ; Kaj valizoj
- '15 Por kongreso.; Miraklimpreso!
- '16 Fraka vesto, ; Bala festo,
- '17 Naci-kostumo, ; Amindumo.
- '18 Hispanino, ; Korinklino
- '19 Kaj esperoj, ; Amleteroj.
- '20 Mielo, ; Ĉielo!
- '21 Edzino; FINO!!



10/38

& Esperanta geedziĝo (1):

'1 A/peris pri-
edziĝa peto ;
De junulo en
gazeto,...

(x:: **Ho, estu
vi amiko mia ;
restu kun mi
en la ĉeno!**)

(#: <:19> (o;So /dodo doSo
LaLa LaMi; FaFa SoSo
SoRe Mi Mi;So dodo doSo
LaLa LaMi; FaFa SoSo SoTI
Do Do)x22)+(&:



'2 Responde
skribis
junulino ; Pri
samtema
korinklino, –
.....

'3 Kaj baldaŭ
ili, laŭ
promeso, ;
Renkontiĝis ĉe
l' kongreso. –

'4 Ĉar ili
plaĉis
reciproke, ;
Geedziĝis tuj,
samloke. –

'5 Ĝi estis grandioza festo ; Pro
multnombra homĉeesto! –

& Esperanta geedziĝo (2):

(x:; Ho, estu vi amiko mia ;
restu kun mi en la ĉeno!)

'6 Ne multaj ĉe la pastra beno, ; Sed
– multegaj ĉe l' festeno! –

'7 Kaj la kongressekretario ; Zorgis pri
l' ceremonio: –

'8 Soifa Lingv'-Komitatano ; Trinkis je l'
geedza sano; –

& Esperanta geedziĝo (3):

'9 Kasisto perdis sian kason ; Dum li malplenigis glason: –

'10 Kaj oni aŭdis Prezidanton ; Kanti tre petolan kanton; –

'11 Mallerta Akademiano ; Rompis glason da ĉampano:

'12 Vegetarano pro sufoko ; Glutis oston de la koko; –

'13 Kaj ĉastemulo kun plezuro ; Pinĉis en virina kruro; –

'14 Abstinenculo, ve, sen danko, ; Multe vomis sur la planko; –

'15 Entute ĉiuj festaranĝon ; Longe laŭdis kaj la manĝon... ..

'16 La nova paro ĝojpetola ; Tre deziris... esti sola, –

(x:; **Ho, estu vi amiko mia ; restu kun mi en la ĉeno!**)

'17 Al ĉiuj do adiaŭdiris, ; Kaj diskrete ili iris, –

'18 De U. E. A. la delegito ; Gvidis ilin ĝis la lito, –

'19 Kaj tiam li, – pro bona ordo, – ; Gardostaris ĉe la pordo; –

'20 Rigardis li, pro malenuo, ; Iom tra l' serura truo, –

'21 Kaj poste sendis li, laŭ devo, ; La raporton al Ĝenevo*, –

'22 Ni legos eble pri detaloj ; en Jarlibro aŭ ĵurnaloj... ..)



14/38

& Festeno (1):

(#: <:29> (#Suđuroy: /do|So LaTi dodo dooTi;Ti TiLa LaSo SoMi; So LaTi dodo dooTi;Ti TiLa LaSo LaSo; (#Rekantaĵo: MiSo So FaMi redo; do dodo re; rere mire doTi La;So So LaTi do o;))x29)+(&:

,& Unua:

'1 /Kunsidis por festeno, preteĝaj al atakoj, ; Dum ĝua koncentriĝo almenaŭ cent stomakoj,

(x:;Bruas danco en halo, dancu

en ĉen'! ; Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.)

'2 Kaj akra saŭcodoro simile al incito ; Kreskigis la mezuron de sana apetito.

,& Dua:

'3 Jam kuŝis sur la tablo, – pli ĝuste sur l' altaro – ; La ofertita besto, kaj estis ĝi omaro.

'4 Omaro netranĉita, en sia tuta formo ; Aspektis ŝafe milda kaj en profunda dormo;

'5 Videble pri marbordoĝi sonĝis sensuspekte, ; Sed saĝa festenano leviĝis kaj afekte

'6 Kun larva emocio li plendis al najbaro: ; "Ĝi ne efektiviĝos, la sonĝo de l' omaro*!!"



& Festeno (2):

,& Tria:

'7 Kaj en regula takto dufoje cent makzeloj ;
Movigis dum maĉado samtiom da oreloj... ..

'8 Dank' al kaprica vino ruĝiĝis palaj vangoj ;
Kaj babileme tiam sin movis ĉiuj langoj.

'9 Pri arto, pri scienco kaj nun pri politiko ;
Sagace sin ekzercis diskuto kaj kritiko,

'10 Sed ŝvebis
harmonio eĉ super tikla
temo, ; Ĉar ĉiuj sin
distingis per vera...
teleremo!!

,& Kvara:

'11 Fervora komunisto predikis
elokvente ; Pri nova ŝtatsistemo
kaj montris argumente

'12 Disigajn diferencojn de
diversrangaj klasoj... ; Dum fajro
de l' diskuto li el najbaraj glasoj
.....

'13 Trinketis
senatente, –
sed tiu ĉi
detalo ;
Klarigas l'
originon de
ĉiu... glas-
batalo!*



& Festeno (3):

,& Kvina:

'14 Subite tra la pordo – (ĝi estis nefermita) ; Eniris grava viro kaj venis seninvita.

'15 Ni scias laŭ proverbo, ĉu ne, ke "la petito" ; Dummanĝe venas, tamen jen venis nepetito!


'16 Kaj tiu grava viro, suĉinte kokan oston, ; Pri sia personeco komencis longan toston.

'17 – La mutaj samtablanoj konjektis kun angoro : "Ho, Dio, kiom tostas ĉi tiu oratoro!?" –

'18 De Ventra Komitato leteron li laŭtleĝis, ; Laŭ ĝi oficiale lin mem oni delegis,

'19 Por ke oficiale ĉeestu li festenon ; Al ĉiuj alportante oficialan benon.

'20 Ĝistede li insistis per tiu ĉi formulo :
"Resume do mi estas la Oficialulo!"



& Festeno (4):

,& Sesa:

'21 En tiu ĉi momento veplenda ĝemsopiro ; Haltigis la torenton de nia verva viro,

'22 Kaj baldaŭ multobliĝis la krioj kaj la ploroj, ; Kaj multaj festenanoj tordiĝis pro doloroj

'23 Frotante ŝvelan ventron, kaj tiel, per mimiko, ; La suferantoj plendis sendube pri koliko!

.....
'24 Jam kelkaj naivuloj kun tima superstiĉo ; Akuzis l' oratoron pri tiu malfeliĉo,

'25 Sed iu, almontrante al jam malplena poto, ; Ekkriis: "Ne! – Ni estas viktimoj de... kompoto!!"

,& Sepa:

'26 Kaj nun sin manifestis fatalo senkompata, ; (Prefere mi silentus pri punkto delikata!)

'27 Sed malgraŭ diskretemo de ĉasta embaraso ; Aŭdiĝis bru' simila al eksplodanta gaso,

'28 Kaj sub venĝanta premo perfida de skrupulo ; Honteme ekruĝiĝis... la Oficialulo!...

,& Oka:

'29 Saĝuloj tuj konkludis, facile, sen enketo: ; "La Oficiala... Gaseto!!"





19/38

S. H. W. 1938

& Juĝu prudente! (1):

(#: <:43> (o;So /doododo dododo SooSoSo SooSo,So
LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;So doododo dododo
SooSoSo SooSo;So LaaLaLa reeredo TiiLaLa So So;h
(#Rekantaĵe: miimimi mire dooTiTi do; reerere reedodo
TiLa Ti; doododo miidodo LaaLaLa doLa SooSoSo
doododo TiiTiTi do; doododo miidodo LaaLaLa doLa
SooSoSo doodore miirere do;)x8)+(&:

'1 (': Ŝi /hejmenrevenis kun granda
skatolo,) (,,: Kun granda skatolo ŝi
hejmenrevenis ;) Kaj jam – laŭ klasika
eterna edz-rola – ; Pagotanta fakturon en
mano mi tenis.

(x,: Kantu fiere, kantu en ĉeno! ; Paŝu
surtere, ĝin draŝu jen! (; Kune en
rondo ne zorgu pri mondo, tondru la
ĝojo en danca la hal'!)x2)

RAYMOND SCHWARTZ



& Juĝu prudente! (2):

(x:; **Kantu fiere, kantu en ĉen! ;
Paŝu surtere, ĝin draŝu jen! (;
Kune en rondo ne zorgu pri
mondo, tondru la ĝojo en danca la
hal'!)**)x2)

'2 "Ne grumblu!" ŝi diris per voĉo
anĝela, ; Per voĉo anĝela "Ne
grumblu!" ŝi diris, ; "Rigardu, mi
estos centfoje pli bela ; En tiu ĉi
robo," – kaj ŝi sin admiris.

'3 Mi juĝis severe pro nigra humoro, ;
Pro nigra humoro mi juĝis severe: ;
"Sendube vin mokis kanajla tajloro,
Vi tiavestite aspektas ansere;

'4 Jen sub la femurojn deglitas talio, ;
Deglitas talio jen sub la femurojn, ;
Kaj fuŝe desegnas la dorsa linio ; Sur
via dorsparto kubistajn konturojn!"

.....

'5 Pli ol mi imagis ŝi restis silenta, Ŝi
restis silenta pli ol mi imagis ; Kaj mi
nur memoras, ke malgraŭkonsenta;
Finfine devige la robon... mi pagis.

'6 Mi ĉion komprenis pri l' ŝajna
mistero, ; Pri l' ŝajna mistero mi ĉion
komprenis ; Nur kiam ok tagojn post tiu
vespero ; Kun granda skatolo ŝi
hejmenrevenis!

'7 Karese ŝi petis "Ne grumblu,
karulo," ; "Ne grumblu, karulo", karese
ŝi petis, ; "L' alia ne plaĉis al via okulo ;
Kaj tial obee mi novan aĉetis, –

'8 La mian staturon ĝi muldas mir-mire,
; Ĝi muldas mir-mire la mian staturon, ;
Bonvolu konstati..." kaj stulte sendire ;
Mi tenis en mano jam novan fakturon!
.....)

& Kata logo (1):

(#: <:67> (/DoDo MiSo dodo LaSo; dodo LaSo dodo dodo; DoDo MiSo dodo LaSo; dodo LaSo TiTi TiTi; SoSo (#Rekantaĵe: Tire fafa mire; fafa mire so so;)
(#Ripetaĵe: sola somi fare Tire dodo doTi do omi;)
(#Rekantaĵe: so somi domi So; so somi domi So; mi redo mimi redo mire redi re emi; fa fare Tire So; fa fare Tire So; fa mire so mi redo doTi dore do do o))x6)+(&:

'1 /Se vi pipon vire fumas,
; Sen intesta embaraso, ;
Kaj soife okulumas ; Al
belŝaŭma bierglaso, (':;
Jen vi


(x:; estas taŭga
frato ; De la
Verda Kato!))

(,:: Jen vi estas
taŭga frato ; De
la Verda Kat'!)

(x:; 2x (Paŝu nun en la danc'! ;)x2 kaj
estu taŭga frato ; de la Verda Kato!)

'2 Se vi povas dum
diboĉo, ; Kiel sana
filozofo, ; Kanti per
miaŭa voĉo; Ĝis la
fina kata strofo, ;
Jen vi

'3 Se vi scias per
mokvorto ; Ŝerci pri
respekta moro, ; Se
vi povas ĝis la
morto ; Nutri vin per
bonhumoro, ; Jen vi
.....



& Kata logo (2):

'4 Sed!! Se peze kun prediko ; Vi grumbladas pri moralo ; Kaj pro konscienc-koliko ; Manĝas herbojn nur sen salo, ; Vi ne

'5 Se vi prude kaj sendistre ; Ŝatas mola sur kanapo ; Ronki pace kaj filistre ; Kun pantofloj kaj noktĉapo, ; Vi ne

'6 Se anstataŭ eĉ absinton ; Trinki freŝe el botelo ; Vi preferas suĉi pinton ; De malseka pluvombrelo, ; Vi ne





24/38

& La filo de l' bataliono (1):

(#: <:31> (#4740: < Marŝo, :4> (/SoSo Mi3Mi MiSo DoDo; LaLa So3So
SoSo ReRe; FaFa TI3TI TIRe SO3SO; SoSo Mi3Mi MiSo DoDo

(#Rekantaĵe;; SoSo Mi3Mi MiSo DoDo; DoDo Fa3Fa FaLa dodo; TiLa So
TiLa SoSo FaTI Do o))x12)+(&:

'1 /Sub Afrik-ĉieloj brulaj, ; meze de l' plej
negra gento ; Sole estis blankhaŭtulaj ; La
soldatoj de taĉmento,

(x:; **kaj bezonas mi en vivo ; por amora
efektivo ; kunulinon kun varma mola sin'.)**

'2 Kaj en tiu regiono ; La solsola blankulino ;
Estis ĉe l' bataliono ; De l' major' kuiristino.

.....

'3 La majoro, vigla viro, ; Ŝatis ŝin pro spertaj
konoj ; En la arto de l' kuirado ; Kaj... de l' homaj
am-bezonoj... ..

'4 Sed sekrete ankaŭ uzis ; Ŝin la juna
leŭtenanto, ; Ĉar neniam ŝi rifuzis ; Sian
koron al petanto!



& La filo de l' bataliono (2):

(x:: kaj bezonas mi en vivo ;
por amora efektivo ; kunulinon
kun varma mola sin'.)

'5 Kaj havante superfluon ; Ofte da
temperamento ; Ŝi konsentis rendevuon
; Ankaŭ al la ĉefserĝento!

'6 Ĉar ŝi estis tre diskreta, ; Ĉiu el l'
amantoj kredis, ; Ke dum rendevu'
sekreta ; Li tutsola ŝin posedis... ..

'7 Tial, foje, kiam temis ; Pri videbla
gravedeco, ; Kulpkonscie ĉiu tremis ;
Pro la timo de patreco... ..


'8 Kaj ŝi lerte ekspluatis ; Ruz-minace la
fatalon, ; Ĉar neniu multe ŝatis ; Mokan
ridon nek skandalon!

'9 Efektive la majoro ; Tuj aĉetis la
silenton ; Li je ŝia solfavoro ;
Skribis sian testamenton!

'10 Pagis similmaniere ; Leŭtenanto
la silenton, ; Promesante surpapere
; Dum dek jaroj altan renton.

'11 La malriĉa ĉefserĝento ; Faris
kion ŝi proponis ; Por ke daŭru la
silento, ; Li... edziĝpromeson donis!
.....

'12 Multe ridis la soldatoj, ; Kiuj
konis la sekreton, ; Ĉar ŝi naskis
post monatoj ; ... Tute nigran
negruleton!



& La nova jar' (1):

(#: <:61> (o;So /dodo do ore mimi mi i;mi remi fa Ti re do o;so somi la aso sofa
fa a;fa fare so ofa fami mi; So dodo do ore mimi mi i;mi remi fa Ti re do
(#Rekantaĵe: o;so somi la aso sofa fa a;fa fare sofa fami mi; So dodo do ore
mimi mi i;mi remi fa Ti redo do do))x8)+ (&:

'1 La /Nova Jar', La Nova Jar' ; La
homojn plibonigas! ; Sur ĉiu strat', en
ĉiu dom' ; Afabla estas ĉiu hom' ;
La Nova Jar', la Nova Jar' ; La
homojn afabligas!

(x:; **La nova jaro venas jam ;
kaj estas nia finproklam': ; La
homojn vidu ni kun am' ;
almenaŭ unu nuran tagon.**)

'2 La pordistin', la pordistin' ;
Nun ĉiam bonhumoras! ;
Antaŭe vane kaj sen fin
Dumnokte mi
petegis ŝin, ; Sed nun
ŝi enirigas min ; Tuj kiam
eksonoras!

'3 La poŝtportist', la
poŝtportist' ; Deĵoris tre
malbone! ; Ne venis li
dum pluvveter' ; Kaj
nur malofte
dum somer', ;
Sed eĉ por
simpla
cirkuler' ; Li
venas
nun
persone!
.....



& La nova jar' (2):

'4 Kaj la barbist' traktadis min ;
Samkiel malamikon! ; Li senhezite,
laŭ okaz', ; Detranĉis pecon de la
naz', ; Kaj li al mi sen parafraz' ;
Manĝigis la penikon!


'6 Kaj malfidela amatin', ; Al kiu mi
min donis, ; Kaj kiu laŭ infera plan'
; Min trompis kun amerikan', ; Ŝi
skribis ĵus per propra man' ; ... Ke
ŝi al mi pardonis!!

'7 Restoracia
ĉefkelner', ; Li
estis ĉefbarbaro!
; Al mia frako kaj
kravat' ;
Ŝprucigis
saŭcon kun
salat', ; Sed de
nun li pro
korkompat' ; Ĝin
verŝas al
najbaro!

'5 Sed la barbist', sed la barbist'
; Min razas nun senvunde! ; Kaj
kun ĝentila kompliment' ; Li
diras, plena je atent': ; "De viaj
haroj cent po cent ; Rekreskas
tre abunde!"

(x.; **La nova jaro venas jam ;**
kaj estas nia finproklam' ; La
homojn vidu ni kun am' ;
almenaŭ unu nuran tagon.)

'8 Ho Nova Jar', mi amas vin ;
Pro via dolĉa paco! ; Sed diru,
ĉu sincere vi ; **Tutsola sorĉas**
ĉion ĉi, ; Aŭ ĉu ĝin faras multe pli
; Nur la Novjar-Donaco??



29/38



& Mia kunulino (1):

(#: <:34> (/fami sofa
fami mire; rere dore
mimi; miimimi fami fami
faso; sofa fafamii redo;
(#Rekantaĵe: mimi fa mi
re; rere dore mi; mimi
mimi mi fa;so sofa fami
fami reldo; mimi fa mi re
e))x7)+(&:

'1 /Ke vi plaĉas al
deziroj, ; Tion mi ja
scias, ; En la urbo ĉiuj
viroj ; Min pro vi envias...

(x: **Dancu mastrino ;
belan elektas mi. ;
Dancu min al mano ; ja
bele kiel povas vi2. ;
Dancu mastrino.)**



& Mia kunulino (2):

(x: Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.)

'2 Ĉar vi estas vere bela, ; Varma sub la tuŝo, ; Kaj dolĉaĵo purmiela ; Por ĝuema buŝo!

'3 Mi vin amas, ĉar konsole ; Splenon vi forprenas ; Kaj precipe, ĉar vi sole ; Al mi apartenas;

'4 Ĉar vi ofte dum enua ; Nokto min amuzis, ; Kaj ĉar estis mi l' unua, ; Kiu vin ekuzis!

'5 Dank' al vi la vivo fine ; Havas taŭgan centron: ; Mi plenigas laŭdestine ; Vian rondan ventron,

'6 Kaj vi baldaŭ fajrobrula ; Ardas ĝoj-feliĉe ; Kaj dum memofer' stimula ; Mortas konsumiĝe... ..

'7 Tamen vi sindone restas ; Sur suĉanta lipo, ; Kaj mi sentas, ke vi estas ; Mia kara pipo!

...KUN
SIASPECA
SPICO!



RAYMOND
SCHWARTZ

& Ministro-filistro (1):

(#: <:41> (/LATI DoRe MiFa MiDo; LaTi doTi
LaSo MiDo; LaTi doTi LaSo Mi; ReFa MiRe
DoMi So; ReFa MiRe Mi Mi; (#Rekantaĵe: DoRe
MiFa MiRe MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; LaTi
doTi LaSo Mi; ReFa MiRe DoMi So; TIRe DoTi
LA LA A))x7)+(&:

'1 /Foje regis en Francujo ; La Ministro de l'
inkujo, ; Estis li sinjor' Bérard, ; Klera viro,
sen erar', ; Sed – li estis stulta!

(x:; **Fluas akvo sub la ponto ; ĝis la maro
de la monto. ; Sur la ponto pasas multo ;
kaj de saĝo kaj de stulto ; kaj por homa
honto.)**

'2 Kaj li pli ol virin-amon ; ŝatis sian propran
famon, ; Estis lia kor-dezir' ; Tuj fariĝi glora
vir' ; Kaj kolekti laŭrojn!

'3 Li do pensis unu tagon: ; "Nun mi faros
gloran agon!" ; Kaj tuj senhezite li ; Kun
laŭdinda energi' ; ... Skribis cirkuleron!



& Ministro-filistro (2):

(x:: **Fluas akvo sub la ponto**
; **ĝis la maro de la monto.** ;
Sur la ponto pasas multo ;
kaj de saĝo kaj de stulto ;
kaj por homa honto.)



'4 Li dekretis tre severe: ;
"Esperanto estas vere ;
Senespera utopi' ; Kaj cetere
diras Mi, ; Ke ĝi ne ekzistas!"

'5 Ĉu ĉi tiu fuŝprofeto ; Nun
sukcesos per dekreto ;
Malkonstrui en moment' ; La
esperon de jarcent', ; Nian karan
lingvon?

'6 Ho, Ministro kun la Plumo, ; Via
famo estas... fumo! ; Dum, kun via
cirkuler'; Vi jam kuŝos sub la ter' ;
Vivos Esperanto!

'7 Eĉ Ministro fuŝkonsila ; Povas
esti tre utila, ; Li kun tiu ĉi
program' ; Faris certe por reklam'
; Pli ol cent poetoj!!

34/38

FØROYAR 25 kr

CZ. SLANIA J.C.

2002

100 føroysk frímerki
Czesław Slania

Fo 462

Emil Krause
Føroyskur dansur á Viðareiði

& Preciza Raporto pri la Dekkvina Kongreso en Nürenberg de nia Usona Amiko Sam Ideano(1):

(#: <:31> (o;so /so fami mi remi mi remi mi re;mi mi remi so miso sofa mi rere;
(#Rekantaĵe: rere dire re dilre fa a mi; rere do relmi so lalti la a so))x28)+(&:

'1 "Mi /lasis Usonon, – jen
grava signifo – ; Kun ĝoja
ekspiro kaj... granda soifo,
(x: #B: **Bravaj kamarado2j,
drinku ; Babilade2 nin
ko2nvinku.**)

Kun /belaj esperoj kaj multaj
dolaroj ; Alvenis en lando de l'
bravaj bavaroj. (x: #B)

'2 Mi diros mallonge pri l' urbo
kongresa, ; Ke vere ĝi estas
tre, tre interesa, Neniam
mi vidis per propraj oreloj (*) ;
Pli multe da plenaj
bierobareloj!

'3 Malferma kunsido! –
Kortuŝa momento! ; Kaj ĉiuj
ekploris dum laŭta silento, –
..... Ĉeestis multege da
homoj, ververe, ; Pro manko
de loko mi restis ekstere.

'4 Mi restis ekstere de l'
homa amaso ; Kaj sidis
prudente sur granda teraso,
..... Mi tie precize kun ŝaga
bavaro ; Kalkulis la nombron
de l' kongresanaro:

& Preciza Raporto pri la Dekkvina Kongreso en Nürnberg de nia Usona Amiko Sam Ideano (2):

'5 Ne enkalkulite idistaj friponoj ;
Sendube ĉeestis ducentmilionoj!
Mi devas aldoni, ke tiom, en tuto, ;
Kalkulis ni laŭ la germana valuto*

'6 Dum tiu ĉi tempo, per urĝa decido, ;
Ĵus estis fermita l' unua kunsido,
Kaj ĉiuj aplaŭdis kaj longa ekkrio ;
Pliigis la ĉarmon de l' ceremonio... ..

'7 La dua kunsido dum tri aŭ kvar
horoj ; Sin devis okupi pri gravaj
laboroj, Mi iris, ĉar iom mi estis
scivola, ; Kaj – krom prezidanto mi
estis la sola!

'8 Sed la prezidanto post mia alveno
; Parolis ĝentile pri kora bonveno,
Kaj li min salutis per flataj titoloj ; En
nomo de ĉiuj afrikaj popoloj.

'9 Responde al tiu afabla persono ;
Mi donis salutojn el seka Usono,
Li dankis laŭdece kaj nun senriproĉe
; Ni ambaŭ ekkantis la himnon
kvarvoĉe!

'10 Ni ankaŭ respektis kutiman
programon ; Kaj sendis
gratulan saluttelegramon
Al ĉiu ministro de la
Respubliko, ; ... Ĉar tio utilas
por la statistiko!!



Vole...

...Novele

& Preciza Raporto... (3):

'11 Mi poste proponis, pro manko de loko, ; Prokrasti l' kunsidon ĝis nova epoko, Ni ambaŭ aplaŭdis kaj longa ekkrio ; Pliigis la ĉarmon de l' ceremonio!

'12 Sed antaŭ disiro, laŭ pia kutimo, ; Protestis mi kontraŭ la seka reĝimo, Kaj tuj de l' paroloj mi paŝis al agoj ; Kaj trinkis senhalte dum tutaj tri tagoj:

'13 Post tio dek horojn en lito mi restis, ; Kaj ellitiĝinte mi ree protestis, Ĉar oni akceptis per laŭta jes-krio ; Pornova kongreso la urbon Sofio... ..

'14 Sofio, Sofio! – Ho stulta decido ; Plenplena je ruza insida perfido! Ĉu do vi ne vidas? Kun lerta modifo ; En vorto "Sofio" sin kaŝas "SOIFO!"... ..)

*Raymond
Schwarz*

Dankon!

Martin kaj amikoj de Granda Kurlo



<http://tretis.tone.se>